# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-02 n-ro 404

# La unua Superluno de 2018 aperos en Novjara Tago



Ĉefo de UN urĝis tutan mondon unuiĝi por trakti urĝajn defiojn en 2018

Sinmortiga atako mortigis 12 homojn en orienta Afganujo

Kial bonaj intencoj tiel ofte malsukcesas

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

## Ĉefo de UN urĝis tutan mondon unuiĝi por trakti urĝajn defiojn en 2018
*La monda komunumo povas solvi konfliktojn, venki malamon kaj protekti komunajn valorojn p. 03*

## Sinmortiga atako mortigis 12 homojn en orienta Afganiujo
*Kaj 16 aliaj vunditaj p. 03*

## Argentino: la 127-a bebo ŝtelita dum la diktaturo estas retrovita
*Tio estas nova sukceso por la Avinoj de la placo de majo p. 04*

## Per tromp-logilo polico arestis krimulojn
*Aresto da 21 homoj p. 04*

## La unua Superluno de 2018 aperos en Novjara Tago – kaj tio eĉ estas pli speciala
*Lupluno kaj Sanga Luno p. 05*

## Kial bonaj intencoj tiel ofte malsukcesas
*Nur 30 procentoj de la bonaj intencoj havas realan ŝancon daŭri p. 06*

## Hodiaŭe
*Isaac Asimov; Mendele Sforim; kaj Estonio p. 07*

# Ĉefo de UN urĝis tutan mondon unuiĝi por trakti urĝajn defiojn en 2018

En sia novjara mesaĝo, ĝenerala sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj António GUTERRES alvokis la tutan mondon unuiĝi por trakti neelteneblajn defiojn kaj protekti komunajn valorojn.



La ĝenerala sekretario diris en dimanĉo, kiu estis la lasta tago de 2017 en iuj landoj, sed la novjara tago en la aliaj landoj, ke en la novjara tago, li ne faras alvokon, sed li publikigas averton, ruĝan averton al la tuta mondo. Li diris, ke en la komenco de 2018, li alvokas por unueco. La monda komunumo povas solvi konfliktojn, venki malamon kaj protekti komunajn valorojn. Tamen ni povas fari tion nur kune. Li aldonis, ke unueco estas la vojo, kaj nia estonteco dependas de ĝi. Li urĝis la gvidantojn de ĉiuj landoj mallongigi la distancon, transponti malkonsentojn kaj rekonstrui konfidon per kunigo de homoj ĉirkaŭ komunaj celoj.

Fine, la ĝenerala sekretario esprimis sian dankemon al ĉiuj popoloj en la angla, araba, ĉina, franca, rusa , hispana kaj portugala lingvoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Sinmortiga atako mortigis 12 homojn en orienta Afganujo

La registaro de la afgana orienta provinco *Nangarhar* dimanĉe [31 dec 2017] konfirmis, ke 12 homoj estis mortigitaj kaj 16 aliaj vunditaj en bombatako en *Dzhalal-Abad*, ĉefurbo de la provinco.



Loka oficialulo diris kun kondiĉo de anonimeco, ke tiutage je la 13-a horo kaj 30 minutoj, la atakanto eksplodigis kunportitan bombon inter homamasoj en entombiga ceremonio de eksa ĉefo de distrikto en la provinco. Ankoraŭ neniu grupo aŭ individuo deklaris respondecon pri la atako.

Oficialaj analizistoj opiniis, ke laŭ la metodo, la atako plej eble estis efektivigita de membroj de la ekstremisma grupo Islama Ŝtato. En decembro de 2017, la Islama Ŝtato lanĉis kelkajn atakojn en la ĉefurbo Kabulo. En Afganujo estas pli ol dekmil ekstremistoj de la Islama Ŝtato, kaj parto de ili venis el Irako kaj Sirio.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Argentino: la 127-a bebo ŝtelita dum la diktaturo estas retrovita

La Avinoj de Placo Majo anoncis, ke ili identigis virinon, forkaptitan kiam ŝi estis bebo, fare de militistoj dum la diktaturo (1976-1983) en Argentino.



Tio estas nova sukceso por la Avinoj de la placo de majo.

Ili retrovis la 127-an infanon, forkaptitan fare de la militistoj dum la diktaturo. Ties gepatroj, Maria del Carmen MOYANO kaj Carlos POBLETE, aktivuloj de la peronisma gerilo, estis forkaptitaj en Kordobo en 1977, dum Maria gravediĝis de antaŭ naŭ monatoj. La infano, knabino, naskiĝis en detencentro. La paro neniam reaperis.

La identeco de tiu virino 40-jara ne estis malkaŝita, sed ŝiaj biologiaj onklinoj atendas ŝin rezolute:

«Ni luktis kune kun ambaŭ familioj dum 40 jaroj, kaj ni diras al nia nevino, ke ŝi trankviliĝu, eksplikas Esla POBLETE, fratino de Carlos Simon POBLETE, dum gazetkunsido en Bonaero. Ni lasos al ŝi la necesan tempon, ke ŝi asimilu tiun situacion».

La Avinoj de la placo de majo festas ĉi-jare la 40an datrevenon de sia organizaĵo.

Neniam Milito Inter ni

---

# Per tromp-logilo polico arestis krimulojn

Jen taktiko, kiu certe ne estas instruata de polico-akademio, sed ĝi estis uzata de policistoj kaj efikis: la polico de la metropola provinco *South Yorkshire* en Unuiĝinta Reĝlando, sukcesis je aresto de krimuloj sendante al ili kartojn de fikcia firmao kun sciigo pri rajto al kristnaska donaco kadre de lotado.




Surprize diversaj fuĝantoj el justico respondis kaj interkonsentis pri rendevuo por ricevo de la "donaco" por iliaj jarfinaj festoj, sed fakte ili ricevis viziton de la polico.

Tiu polica strategio estis nomata "Agado Ordinara Ilekso" (planto familiara por kristnaska ornamado), kaj rezultis je aresto da 21 homoj inter la tagoj 18-a kaj 19-a de decembro.

Laŭ la detektivestro Lee BERRY la polico daŭre esploros "novajn vojojn" por kapti fuĝantojn. "Sendi policistoj al loĝejoj, kiujn la homoj jam forlasis estas malŝparo de rimedoj" tion li asertis.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# La unua Superluno de 2018 aperos en Novjara Tago – kaj tio eĉ estas pli speciala

La 1-an de januaro – Novjara Tago, ni vidos la unuan superlunon de 2018.



Diversaj kulturoj de la mondo donis diversajn nomojn al ĉiu plenluno de la jaro. La unua superluno de la jaro estas nomita Lupluno, post la ideo ke la lupoj hurlas al la Luno.

Kaj en tiu ĉi kazo, tio ankaŭ estas superluno, plenluno kiu alvenas kiam la Luno estas je aŭ proksima al la parto de ĝia rondiro kiu estas la plej proksima al Tero.

La diferenco inter superluno kaj regula plenluno estas malfacile distingebla – kvankam se vi povus meti superlunon apud mikroluno, kaj la superluno estus je la parto de ĝia rondiro kiu estas la plej malproksima de la Tero, vi povus vidi ĝin.

Sed indas rigardi supren por observi nian ĉielan akompananton, kaj superluno (aŭ alia plenluno) estas tiel bona okazaĵo kiel iu ajn por kontroli ĝin.

Tiu okazaĵo estas iomete pli speciala pro la fakto ke tiu ĉi superluno estas unu el la tri kiujn okazos en vico. La unua aperis je 3-a de decembro, tiu ĉi estas je 1-a de januaro, kaj ni vidos la trian je 31-a de januaro.

Kaj kiel eksplikas afiŝo de NASA pri "superluna trilogio", tiu je 31-a de Januaro sendube vidindas.

**Rigardante al 31-a de januaro**

Dua luno kiu aperos en monato – kiel tiu de 31-a de januaro – estas nomata Blua Luno. Ili okazas unufoje ĉirkaŭ ĉiu du kaj duonaj jaroj.

Sed NASA diras ke "super-blua luno" ankaŭ prezentiĝos tuta Luna Eklipso, aŭ kiam la Luno enviciĝas ke la Tero blokas la lumon de suno kiun ni vias reflektita en la luno. Tio okazas ĉirkaŭ dufoje ĉiujare.

Kiel NASA tion eksplikas: "La luno perdas sian brilon kaj ekprenas tremigan, malpliforta-de-normala brilo el la malabunda sunlumo kiu alvenas tra la atmosfero de Tero. Ofte ĵetante ruĝan nuancon pro la maniero kiel la atmosfero kurbigas la lumon, tute eklipsitaj lunoj estas kelkfoje nomataj "Sangaj Lunoj"

Noah Petro, esplora sciencisto je Kosmofluga Centro *Goddard* de NASA diris: "La luna eklipso je 31-a de januaro estos videbla dum lunsubiro."

"Homoj en orienta Usono, kie la luna eklipso estos parta, devos ellitiĝi en la mateno por vidi ĝin."

Petro diras: "Kaj tiuj okazaĵoj servas por rememorigi nin pri iu afero: La luno estas tre mojosa kaj nepre rigardindas."

Li diris: "La superlunoj estas bonegaj oportunoj por ke la homoj ekkomencu rigardi la lunon, ne nur tiu unua fojo, sed en ĉiu ŝanco kiun ili havas!"

Tiu ĉi artikolo originale estis eldonita en *Business Insider*.

Fonto (Angla): sciencealert.com

scienco.ir

# Kial bonaj intencoj tiel ofte malsukcesas

Ne daŭre persisti en siaj intencoj, tio estas homa. Tion pruvas ankaŭ vido al la historio: "Homoj de ĉiam intencas fari ion kaj malsukcesas pri tio", diras psikologino el *Bremen*, norda Germanio. Pri tio jam raportis ARISTOTELO antaŭ pli ol 2000 jaroj. "Studaĵoj montras ke nur 30 procentoj de la bonaj intencoj havas realan ŝancon daŭri." Post tri semajnoj la unuaj intenculoj rezignas. Post duona jaro restas ankoraŭ nur la duono.



Multaj homoj antaŭe ne pripensas kiujn konsekvencojn havas la vivokonduto kaj kion ili entreprenu se aperas malfacilaĵoj. Pro tio la bonaj intencoj por la nova jaro ne havas grandan ŝancon realiĝi. Tio similas al ritualo simile al gisado de plumbo jarfine.

Fine de la jaro oni faras resumon kaj oni sentas la devon alpreni bonan intencon. Sed se oni ne vere apogas tion, oni malsukcesas en tio.

Kiel homoj ĉiam denove alprenas bonan intencojn por la nova jaro? Ĝenerale homoj ŝatas limtagojn por nova komenco: la jarŝanĝon, la naskiĝtagon aŭ la komencon de la semajno.


Psikologo en la universitato de Konstanco en suda Germanio rekomendas metodon kiu en la scienco nomiĝas mensa kontrastado kun se-tiam-planoj. Tiukaze oni alprenas al si unue celon por konkreta tempospaco kaj due oni imagas la plej bonajn rezultojn, se tio plenumiĝus. En tria paŝo oni pripensas kio povus ankoraŭ forteni onin de tio. Post tio oni fiksas kiel oni reagu pri malhelpaĵoj.

La sukceson de la metodo la psikologo esploris kun kolegoj en studaĵoj kun homoj kiuj volis manĝi malpli da viando. Komence la psikologoj informis la testantojn pri la negativaj sekvoj de troa konsumo de viando. Parto de la partoprenantoĵ de la studaĵo uzis la menciitan metodon. La rezulto estis ke ili pli facile povis realigi sian celon ol aliaj testantoj.

La strategion kiel oni volas atingi siajn bonajn intencojn oni plej bone skribu tute malmoderne per krajono sur paperfolion. "Estas neŭrologie pruvite ke la cerbo aktivigas areojn, se oni skribas mane ol se oni tajpas", diras psikanalizisto. "Per tio ekestas pli kompleksa mensa konstruaĵo."

Apud bona plano fleksebleco plialtigas la ŝancojn pri sukceso. Tio signifas: Se ekzemple okazas tro forta neĝado por kuradi, tiam alternative oni sidiĝas sur la hejma trejnilo aŭ oni iras al hejtata naĝejo. Alikaze la interna maldiligentulo tuj nuligus la bonan intencon.

Esperanta Retradio



## Isaac Asimov

**Isaac Asimov [AJ-zak AZ-i-maf]** ['aɪzək ˈæzɪmɒv/], **originale Исаак Озимов tamen nun transskribita en la rusan lingvon kiel Айзек Азимов, (naskiĝis ĉ. la 20-an de decembro 1919[jul.]/ 2-an de januaro 1920[greg.], mortis la 6-an de aprilo 1992) estis rus-devena usona verkisto de sciencfikcio kaj sciencfakto.**

**En Esperanto aperis:** ***La lasta demando; La unua leĝo*****.**

**Vikipedio**

---

## Mendele Sforim



**Mendele Moicher Sforim [mendele mojĥer sforim] aŭ Mendele Mocher Sforim (naskiĝis la 21-an de decembro 1835 laŭ la julia kalendaro / la 2-an de januaro 1836 laŭ la gregoria en** ***Kopil*** **apud Minsko, mortis la 25-an de novembro 1917 laŭ julia kalendaro respektive la 8-an de decembro 1917 laŭ gregoria en Odeso, hebree** מנדלי מוכר ספרים; **jide** מענדעלע מוכר ספרים**. Patro de jida literaturo kaj unu el pioniroj de la hebrea literaturo.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**Tempesto,** ***Varbla*****,**

**Estonio.**

**Vikipedio**